

# Skiza laborplano

- 0-a leciono.** Prelego/diskuto pri Esperanto. Kun ekspozicieto pri Esperanto aŭ komputila projekciado (fotoj, literaturo, muziko, gazetoj, kongresoj...).
- 1-a leciono:** Estas, kaj, ne, kio, tio. Enkonduko al Esperanto, la alfabeto, elparolo, akcento. La kursanoj kreu kaj skribu frazojn laŭ la tabelo sur la p. 10. Ĉiu prezentu sin.
- 2-a leciono:** Demanda propozicio, la partikulo „ĉu“, la morfemoj „jes, ne“, la konjunkcio „sed“, la prepozicio „antaŭ“, la artikolo „la“, la demanda morfemo „kie?“, la prepozicio „sur“, la personaj pronomoj „li, ŝi“. Kompletiga ekzerco (p. 14).
- 3-a leciono:** La demanda adjektivo „kia“, la kontraŭa signifo per la prefikso „mal-“, la prepozicioj „en, apud, super“. La demanda morfemo „kiu?“. Konversacia ekzerco. Kompletiga ekzerco. Personaj pronomoj.
- 4-a leciono:** La posedaj pronomoj mia, via, lia, ŝia, nia, ilia. La ina genro (la sufikso „-in-“). Multnombro (la finaĵo „-j“). La familio. Ludo (p.23).
- 5-a leciono:** La prepozicioj „al, de“, la morfemo „nun“, la montraĵaj pronomoj „tiu, tie“. Akuzativo. Subjekto, predikato kaj objekto. Konjugacio (deklinacioj). En la ĉambro. Kompletiga ekzerco (mankanta akuzativo, p. 26). Skribu frazojn (tabelo, p. 27). Ludo.
- 6-a leciono:** Numeraloj, kiom, kun, sen, per. La homa korpo. Kompletiga ekzerco (p. 29). La prezenca verba finaĵo „-as“.
- 7-a leciono:** La prezenco, preterito, futuro (-as, -is, -os). La tagoj de la semajno. La prepozicioj „antaŭ, post“. La demanda morfemo „kiel“ (maniero), la konjunkcio „ĉar“. Konverzacio. Adverboj (-e). Kompletiga ekzerco (p. 34).
- 8-a leciono:** Infinitivo (-i), imperativo (-u), la prepozicio „da“ (mezuro aŭ kvanto). La prefikso „ge-“, la demanda morfemo „kial“. Ludo (p. 40).
- 9-a leciono:** La sfiksoj :-ej-, -ist-, -ant-, la prepozicioj „ĉe, inter, el“, komparativo kaj superlativo (pli, plej, malpli, malplej), numeraloj. Nia familio. Ekzercoj.
- 10-a leciono:** Kalendaro (jaro, monatoj), partoj de diurno, demandaj morfemoj „kiam, kiom, kioma“, la nedifinita prepozicio „je“, dato. La sufikso „-ar-“. La prepozicio „ĝis“, la refleksiva pronomo „si“, la adjektivo „sia“. Letero al amiko. Kompletiga ekzerco (p. 51).
- 11-a leciono:** La tabelvortoj (korelativoj) „io, ĉio, nenio, iu, ĉiu, neniu“, la sufiksoj „-ig-, iĝ-“. La sezonoj, la jaro, la semajno. La poemo „La jaro“. Kompletiga ekzerco. Ludo.
- 12-a leciono:** La tabelvortoj (korelativoj) „tia, ia, ĉia, nenia, ie, ĉie, nenie, iam, ĉiam, neniam“, la sufiksoj „-eg-, -et-“. Mateno. Proverboj.
- 13-a leciono:** La sufikso „-il-“, la prefikso „ek-“, la demanda morfemo „kies“, la subjunkcio „ke“, la pronomo „oni“, la tabelvortoj (korelativoj) „iom, tiom“. En la klaso.
- 14-a leciono:** La sufikso „-id-“, la demando pri direkto „kien?“, la prepozicio „pri“, la tabelvortoj (korelativoj) „tial, tiel“. La partikuloj „ajn, ĉi“. Vespero. Proverboj.
- 15-a leciono:** La prepozicioj „por, tra, ĉirkaŭ, kontraŭ“. La kunmeto „por ke“. Kondicionalo. Tagmanĝo. La verboformoj.
- 16-a leciono:** Frakcioj (-on-), la prefikso „po“, la sufiksoj „-op-, -ad-, -obl- -foj-“. Horloĝo, tempo. Ekskurso al la naturo. Anekdoto.
- 17-a leciono:** La esprimoj „rigardi-vidi, aŭskulti-aŭdi, paroli-diri“. La sufiksoj „-aĵ-, -ec-, -ul-“, la prepozicio „for“. La vivo de la homo. Proverboj. En zoologia ĝardeno.
- 18-a leciono:** La subjunkcioj „kvankam, tamen“. La sufiksoj „-em-, -ebl-“, la prefiksoj „re-, dis-“. En la magazeno. La homa korpo.
- 19-a leciono:** La sufiksoj „-ant-, -at-, -estr-, -uj-“. La prefikso „bo-“. La parencoj. Proverboj. En la vilaĝo.
- 20-a leciono:** Kunmetitaj tempoj, participoj (aktivaj kaj pasivaj): la sufiksoj „-int-, -ont-, -it-, -ot-“.
- 21-a leciono:** La sufiksoj „-ind-, -um-, -nj-, -ĉj-, -nj-“. La prepozicioj „anstaŭ, apenaŭ, kvazaŭ“. Proverboj. Fabelo pri la sep kapridoj.
- 22-a leciono:** La prepozicioj „trans, preter, ekster, laŭ, ĵus“. Anekdotoj. La ĉiutaga Esperanto: salutoj, prezento, vizito, sur la strato, vojaĝado, oftaj demandoj, tempo, vetero, surskriboj, aliaj oftaj frazoj. Vestajoj.